Internacia Fervojisto

Dumonata organo de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF)

revuo pri fervojo

ISSN 1397-4270

2025.5

La reloj ligas la landojn – Esperanto la popolojn

UK Brno-faka ekskurso

Estimataj gelegantoj

Dum la UK en Brno mi renkontis sinjorinon Jindřiška Drahotová, kiu donacis al mi sian publikaĵon „Legaĵoj XIV“ – kolekton de mallongaj rakontoj, artikoloj, informoj ktp. kun profundaj pensoj.

Tuj la unua artikolo „Preĝo je vero“ de ĉeĥa verkisto, intelektulo, ĵurnalisto kaj tradukisto Karel Čapek interesis min tiel forte, ke mi volas atentigi vin pri ĝi. La artikolo estas fakte traduko de la gazetartikolo, kiu aperis en gazeto „Lidové noviny“ (Popola gazeto) la 25-an de Septembro 1938 precize tri monatojn antaŭ la morto de la aŭtoro.

En la artikolo la aŭtoro preĝas al Dio por redoni al mondo veron, ĉar mensogoj venenas naciojn kaj fosas inter ili abismojn, kiujn oni ne povas dum dekoj da jaroj forigi. Kiel povas realiĝi kunvivado inter homoj kaj nacioj, se oni ĵetas tiom da insultoj, tiom da malestimoj kaj koleroj?
La artikolo finiĝas: „Nur sen mensogoj homoj kaj nacioj inter-kompreniĝos, spite la diversajn lingvojn kiujn ili havas. Dio, redonu al mondo veron!“

La artikolo havis profundan signifon sojle de la Dua mondmilito. Pensoj en ĝi prezentitaj havas valoron trans jardekoj kaj estas aktualaj ankaŭ nun.

PhDr Karel Čapek (09.01.1890-25.12.1938

Via redaktoro, Fonto: LEGAĴOJ XIV., drahotova@esperanto.cz

Enhavo:

Estimataj gelegantoj 90
UK Brno - komitatkunsidoj....92
Nova estraro de la Bulgara Esperanto-Asocio 93
IFEF dum la 110-a UK en Brno 94
Raporto pri faka ekskurso al la fervoja entrepreno AŽD 95
La 110-a Universala Kongreso en Brno 26.7.-2.8.2025....97
Öresundbron – Øresundsbron – 25-jara 100
Grandrapidaj trajnoj en Usono 102
Fervojlinio Tanzanio - Burundio....102
Novaĵoj el *Railtech.com* 104
Historia fervojlinio *NYMR* 105
E-renkontiĝo en groto 107
Amuza anguleto....108

Titolpaĝo: Partoprenantoj de la faka ekskurso dum UK Brno

Internacia Fervojisto
Dumonata fervojfaka revuo en Esperanto kaj organo de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF)
Apero: Januaro, Marto, Majo, Julio, Septembro, Novembro
Redaktofino: La 10-a de la antaŭa monato

Estraro de IFEF
Prezidantino: Andrea Švubová (Ĉeĥa Respubliko) prezidantino@ifef.net
Sekretario: Vito Tornillo (Italio) sekretario@ifef.net
Kasisto: Laurent Vignaud (Francio) kasisto@ifef.net
Redaktoro: Ladislav Kovář (Ĉeĥa Respubliko) redaktoro@ifef.net
Gvidanto de la Faka Komisiono: momente neokupita

Membroj de la Redaktora Komisiono
Lene Niemann (Danio), Guido Brandenburg (Germanio),
Zlatko Hinšt (Kroatio), Laurent Vignaud (Francio)

Membroj de la Faka Komisiono
Guido Brandenburg (Germanio), ts@ifef.net
Jaroslav Matuška (Ĉeĥa Respubliko), fas@ifef.net

Bank-Konto:
Nomo: „Laurent Vignaud”
IBAN: FR33 20041 0 1011 0929 374Y 03237
BIC: PSSTFRPPNTE

UEA-konto: iffk-o

Retejo: www.ifef.net
Facebook: https://www.facebook.com/pages/IFEF-Internacia-Fervojista-Esperanto-Federacio/726039834155372

UK Brno - komitatkunsidoj

Dum la Universala kongreso de Esperanto en Brno mi havis honoron anstataŭi la komitatanon „A“ dum la kunvenoj de la UEA-komitato. La unua okazis jam sabate la 26-an de Julio je la 14-a horo kaj daŭris ĝis la 18-a horo. La plej grava parto de la kunveno estis balotoj. Unue ni decidis pri komitatanoj „C“ kaj poste sekvis balotoj de estraro kaj prezidanto de UEA. La estraro konsistas el 9 postenoj kaj ni povis elekti el 11 personoj. Elektitaj estis Fernando Maia, Aleks Kadar, Gong Xiaofeng (Arko), Jérémie Sabiyumva, Seán Ó Riain, So Jinsu, Miora Raveloharison, Zdravka Boytcheva kaj François Lo Jacomo.

Por la posteno de prezidanto estis nur unu kandidato Fernando Maia, kiu sukcesis kaj fariĝis nova prezidanto de UEA. Novaj vicprezidantoj estas Seán Ó Riain kaj So Jinsu. Pri faka agado respondecos Gong Xiaofeng (Arko).

Krom tio ni ankaŭ aprobis novajn honorajn membrojn, inter ili ankaŭ estas Miroslav Malovec, nia ĉeĥa kolego kaj membro de IFEF.

Dum la dimanĉa kunveno (la 27-an de Julio je la 16-a h. ĝis la 18-a h.) ni pritraktis kutimajn asociajn aferojn, kiujn devas plenumi ĉiuj registritaj asocioj. Do ni aprobis raportojn pri agado de UEA, financajn raportojn ktp. Estas grava informo, ke UEA estas nun finance stabila asocio.

Tria kunveno de komitatanoj okazis vendrede matene (la 1-an de Aŭgusto je la 9-a h. ĝis la 12,30 h.) kaj estis dediĉita al statutŝanĝoj, kiujn UEA devos ordigi laŭ nederlanda leĝo, ĉar en tiu lando UEA havas sidejon. Tio aldonas ŝancon modernigi la statuton. Post diskuto oni aprobos novajn statutojn dum la UK en urbo Graz venontjare. Ni ankaŭ aprobis buĝeton por la jaro 2026. La membrokotizoj de UEA por la venonta jaro estos la samaj kiel ĝis nun. Sekvis raporto de LKK kaj aprobo de kongresa rezolucio.

Mi ankaŭ reprezentis IFEF dum la Faka forumo. La nunjara celo estis kolekti informojn pri fakaj asocioj por planita Almanako, kiu aperos aŭtune.

Krom tio mi partoprenis la komitatajn kunvenojn pri kunlaboro kaj pri informado. Ambaŭ estis plenaj de informoj kaj ideoj.

La agado kaj stato de UEA aspektas sufiĉe bone. Dum la kongreso mi renkontiĝis kun multaj laboremaj homoj. Ŝajnas, ke ankaŭ faka agado kreskos, sed tio dependas de ni.

Ladislav HAKL

La nova estraro de la Bulgara Esperanto-Asocio kun inspiro kaj rigardo en la estontecon

Ni kun fiero kaj optimismo prezentas la novelektitan estraron de la Bulgara Esperanto-Asocio, kiu transprenis la torĉon kun ambicio daŭrigi la laboron de siaj antaŭuloj kaj doni novan impulson al la movado enlande kaj eksterlande.

Dum la 76-a Kongreso de la Bulgara Esperanto-Asocio la membroj elektis prezidantinon - inĝ. Veselka Kamburova, vicprezidantinon - Maja Gorova kaj membrojn: Penka Dilova, inĝ. Petja Aleksandrova kaj Elka Mihajlova. Tio estas la unua estraro formita el virinoj. Inĝ. Veselka Kamburova, inĝ. Petja Aleksandrova kaj Penka Dilova estas en la fervojista sekcio longan tempon kaj ili havas multajn spertojn en Esperanto.

Tiu teamo de sindonemaj kaj inspiritaj homoj kunigas sperton kaj freŝajn ideojn, tradicion kaj modernan pensadon - promesplena komenco por la venonta etapo en la evoluo de nia Esperanto-movado. Ilia entuziasmo jam senteblas – en la deziro organizi pli da renkontiĝoj, vivan komu-

nikadon inter la generacioj, kulturan interŝanĝon kaj internacian kunlaboron.

Gravaj gvidprincipoj por estonta agado de la nova estraro estas plifortigi la popularecon de Esperanto, iniciati internaciajn kontaktojn, riĉigi kulturajn interŝanĝojn kaj allogi pli junan generacion al la ideo de Esperanto.

La Bulgara Esperanto-Asocio daŭrigos sian edukadon, subtenon de la lokaj societoj kaj aktivan partoprenon en internaciaj forumoj. Ĝi daŭrigas sian vojon antaŭen kun malfermitaj pordoj por ĉiuj, kiuj kredas ke la lingvo povas esti ponto kaj ne baro.

Ni invitas ĉiujn niajn membrojn kaj subtenantojn aktive partopreni en agado de la Asocio, ĉar kune ni povos pli!!!

Ni invitas vin ĉiujn – malnovajn amikojn kaj novajn vizaĝojn - esti parto de tiu ĉi komunumo de kunlaboro, kompreno kaj amikeco.

Ni daŭre kune konstruu la mondon pri kiu ni revas - paŝon post paŝo, vorton post vorto, koron apud koro.

Vivu la espero!!!

Mallonga prezento de la nova prezidantino

Sinjorino Veselka Kamburova estas inĝeniero, longe engaĝiĝinta en Esperanto-movado. Aktiva membro de la Asocio ekde 1987, ŝi partoprenis plurajn projektojn kun fokuso al la junularo kaj edukado, nacia kaj internacia. Ŝi kredas, ke la estonteco de la movado dependas de ĝia malfermeco, socia engaĝiĝo kaj la kapablo inspiri novajn generaciojn. Esperanto ne estas nur lingvo, sed ĝi estas esprimo de espero por pli justa mondo. Ŝi laboros kun entuziasmo por redoni vivecon al la movado кaj inspiri novajn samideanojn.

Petja ALEKSANDROVA

IFEF dum la 110-a UK en Brno

La kongreso okazis en areo de la Universitato de Mendel (Gregor Johann Mendel 28.7.1822 – 6.1.1884) en Brno – la dua plej granda urbo en Ĉeĥio. La universitato edukas fakulojn pri terkulturo kaj parencaj fakoj. Al la kongreso aliĝis 1132 personoj el 63 landoj, surloke partoprenis 947 kongresanojn el 52 landoj.

La kongreso komenciĝis la 26-an de Julio 2025 per Movada Foiro kiun partoprenis ĉirkaŭ 90 diversaj E-organizoj, inter ili ankaŭ IFEF. La IFEF-budo havis numeron 42 kaj estis bone videbla dank´ al IFEF-afiŝo kaj amaso da propagandaj materialoj. La intereso pri ĝi estis granda kaj ni spertis multajn interesajn renkontiĝojn kaj diskutojn.

La solena inaŭguro de la kongreso okazis sekvan tagon en salono Zamenhof en konstruaĵo *Zoner Bobyhall* proksime de la kongresejo. La salono estis plena de kongresanoj kiuj zorgeme sekvis paroladon de la ĝistiama UEA-prezidanto Duncan Charters, oficialaj gastoj kaj aliaj. Post komuna kantado de la E-himno estis la kongreso malfermita.

Tuj posttagmeze komenciĝis diversaj kunvenoj, seminarioj, prezentaĵoj kaj tiel startis varispeca kongresa programo. IFEF-anojn kaj kelkajn alvenantajn interesulojn interesis faka ekskurso en merkredo, pri kiu skribas detale Hubert Peyrouty en la sekva artikolo.

La IFEF-kunveno okazis ĵaŭde la 31-an de Julio en salono Gacond en la kongresejo. Dum la kunveno Ladislav Hakl prezentis tri prelegojn: „Historio de fervojo en Brno“, „Nova fervoja stacio en Brno“ Kaj „Gravaj fervojprojektoj en Ĉeĥio“. Post la paŭzo parolis Ladislav Kovář pri IFEF – historio, celo, aktivado ktp. Fine de la kunveno li prezentis per fotoj kaj informoj venontjaran IFEF-kongreson en Serbio.

La kongreso finiĝis la 2-an de Aŭgusto per ferma kunveno en la sama salono, kie ĝi komenciĝis. La programon jam gvidis la nova UEA-prezidanto Fernando Maia.

Ladislav KOVÁŘ

Raporto pri faka vizito al la fervoja entrepreno *AŽD Výrobní závod* kaj *SignalProjekt* dum la 110-a Universala Kongreso en Brno.

Merkrede la 30-an de Julio 18 esperantistoj estis invititaj al vizito de la fervojaj entreprenoj *AŽD Výrobní závod* (Aŭtomatigado de Fervojtrafiko, Produktuzino). Akceptis nin la direktorino – Inĝ. Jolana Horsáková kun vicdirektoro por produktado Inĝ. Jiří Pyll.

Komence okazis ĝenerala prezento de la entrepreno kiu produktas elementojn de sekurigaj instalaĵoj por fervojo. Sekve ni vizitis unu el la produktejoj, kie oni produktas elektronikajn "platojn" kiuj formas la bezonatajn cirkvitojn. Tiuj "platoj" trairas tra diversaj maŝinoj. La lasta el ili estas purigmaŝino kiu vekis demandon: kial elektronikaj aparatoj estas lavitaj per akvo? La respondo estis, ke la plej delikataj elementoj estas lokitaj sur la "platoj" post lavado. Grava estas la kontrolo de tiuj "platoj" kiuj estas parto de sekurigaj sistemoj: unue estas vidkontrolo. Poste en alia ateliero okazas la funkciaj kontroloj. Ni ankaŭ vidis la laborejon kie okazas muntado de aparatoj en "ŝrankoj", kiuj estas poste transportataj al loko kie ili funkcios.

Sekvis dua parto de la vizito – al la instru-centro de la entrepreno *SignalProjekt*. Inĝ. Tomáš Juřík kaj Inĝ. Zdeněk Trnka prezentis la entreprenon, kiu havas du fakojn: instruado de fervojistoj pri funkciado de sekurigaj instalaĵoj kaj projektado de novaj sistemoj. Ni poste eniris la instru-ĉambrojn kie oni klarigis kaj demonstris funkciadon de la instalaĵoj. La ĉambroj estas ekipitaj per komputiloj kiujn oni uzas por regi la trajnojn same kiel en realaj kondiĉoj. La diferenco estas, ke ĉi tie estas miniaturaj

trajnoj kiuj veturas. Venis komento, ke tiuj modernaj malproksimaj regadejoj estas perfektaj kiam ili bone funkcias. Sed povas okazi difektiĝoj. Pro tio la instruejo estas ankaŭ ekipita per komputilo, kiu povas simuli difektojn, tiel ke la lernantoj eklernas ne nur la normalan funkciadon, sed ankaŭ kiel reagi kaze de difekto. Kelkaj partoprenantoj havis eblecon elprovi kaj regi trajnojn en la centro. La vizito finiĝis per komuna fotado antaŭ la enirejo de la entrepreno *AŽD Výrobní závod*. Ĉiuj partoprenantoj estis feliĉaj pri tiu tre instrua vizito de la entrepreno *AŽD Výrobní závod* kaj *SignalProjekt*.

HopO

La 110-a Universala Kongreso en Brno 26.7.-2.8.2025

Al la kongreso aliĝis pli ol mil kongresanoj el 63 landoj. Tamen kelkaj ne povis veni pro diversaj kialoj. La kongreso okazis en la dua plej granda urbo de Ĉeĥio – Brno, situanta en la sudoriento. Gastigis ĝin Universitato de Mendel. La revuo Esperanto jam anticipe informis pri la urbo mem kaj pri Ĉeĥio ĝenerale.

Antaŭ la inaŭguro estis elektita nova estraro de UEA. Juna kaj talenta brazilano Fernando Maia fariĝis la nova prezidanto. La temo de la ĉi-jara kongreso estis "Esperanto kaj teknologioj kiel pontoj de paco kaj konfido inter la popoloj".

En ĵurnaloj aperis pluraj artikoloj pri la evento, okazis elsendoj en radio kaj televido. Akurate aperadis bone redaktita kongresa kuriero "Drako de Brno". Ĉe la inaŭguro estis nomumitaj novaj honoraj membroj.

Kiel jam sciate, programo de Universala kongreso estas tre abunda. Oni ĉiam devas elekti inter pluraj samtempaj programeroj tion, kio plej interesas. Tre riĉaj estis kulturaj programeroj kaj vesperaj prezentaĵoj. Sukcesa estis la "Ĉina tago", kiu okazas ĉiujare en UK. La fotoekspozicion "Bela Esperanto, bela Ĉinio" admiris multaj samideanoj. Atenton kaptis ankaŭ la ekspozicio pri filatelo instalita ĉe la enirejo de la kongresejo. Kiel

kutime, ankaŭ ĉi-jare okazis futbalmatĉo kontraŭ lokuloj en kiu venkis nia teamo.

Dum la kongreso ĉeĥoj multe kontribuis al la programo per diversaj prelegoj. Ne mankis gustumado de ĉeĥaj bieroj kaj vizito de bierfabriko. Interesiĝantoj povis lerni la ĉeĥan lingvon, kiu estas tre komplika por eksterlandanoj, ekscii pri la ĉeĥa edukado, pri la ĉeĥa pedagogo kaj humanisto Komenio, kiu jam de la 17-a jarcento proponis la ideon de la internacia lingvo por bona komunikado, pri la historio de E-muzeo en Svitavy, pri la trampa movado en Ĉeĥio, pri la naturo de Brno kaj pri ties ĉirkaŭaĵo. Bele prezentitaj estis la historio kaj la naturo de Ĉeĥio. Oni povis gustumi ne nur ĉeĥajn manĝaĵojn, sed ankaŭ kulturon kaj folkloron, belajn pejzaĝojn dum multaj ekskursoj. Alloga estis vizito al la botanika ĝardeno, kaj fervojistoj kontribuis per informo pri planado konstrui novan, modernan stacidomon en Brno.

Okazis E-kursoj sub gvido de spertaj esperantistoj kaj KER-ekzamenoj. Interesis ankaŭ scienca programo kun prelegoj pri, avantaĝoj kaj malavantaĝoj de novaj teknologioj, artefarita intelekto, demenco kaj dulingvismo, estonteco de Esperanto, aŭtoraj duonhoroj kaj aliaj programeroj (ne eblas listigi ĉiujn). En la programo ne mankis belartaj konkursoj, UEA respondas, Amo-seminario, IKU-prelegoj, Scienca Kafejo kaj la ŝatata aŭkcio. Agrable estis ripozi en ĉirkaŭo de la universitato, eĉ sur arbo.

Al la vesperaj programeroj kontribuis ankaŭ ĉeĥaj artistoj per koncerto de operkantisto Richard Haan, Jolana Smyčková kaj iliaj du knaboj kun la orkestro de la teatro *Semafor*. Muzikgrupo "*Ŝafrda Memory Band*" furoris en vespero per konataj kantoj. Teatro "Verda Banano" prezentis kabaredon "Kongresa Kafejo". La gejunula teatro "DOMA" el Svitavy prezentis teatraĵon "Lampiroj".

Inter esperantistaj artistoj koncertis Ĵele, Amira, Kaŝi, Tim Gallego, Martin kaj Bertilo, La Perdita Generacio, Duo Bemolo. Kajto kiel ĉiam ĝojigis kaj dancigis la publikon. Ĉi-foje Kim animis kongresan balon.

Diversa estis la oferto de duontagaj kaj tuttagaj ekskursoj. Esperantistoj povis kun spertaj ĉiĉeronoj admiri plurajn kastelojn, belajn ĝardenojn, burgojn, grotojn, akvorezervujojn, bierfabrikon, muzeon de Romaa kulturo, aŭ vilaon Tugendhat. Aparta intereso ekestis pri la E-muzeo en Svitavy kaj pri la vespera stelobservejo en Brno kun klarigoj pri la somera ĉielo fare de nia fama astrofizikisto Amri Wandel.

Ĉifoje la nomŝildoj estis presitaj ambaŭflanke, kio estus imitinda en sekvaj kongresoj. Alia pozitiva oferto estis senpaga uzo de trafikrimedoj (krom taksioj). Bedaŭrinde mankis surpaperaj informoj pri Esperanto por scivolemaj preterpasantoj. En Francio oni solvas tion per disdono de etaj kalendaretoj kun koncizaj informoj pri E-gramatiko kun adreso por pli da informoj. Kelkaj salonoj por prelegantoj malgrandis.

Dum la internacia adiaŭa vespero prezentiĝis diversaj talentuloj el niaj vicoj. Ni povis spekti dancojn, kantojn, skeĉojn, muzikadon kaj koruson sub gvido de Zdravka Bojĉeva.

Aparte notinda estas surekrana prezento de la raporto pri la kongresa semajno. Tiu resumo estas granda avantaĝo por rememoro pri la kongresaj aktivadoj. Ĉiuj esperantistoj certe travivis neforgeseblajn momentojn kaj renkontiĝojn kun malnovaj amikoj kaj novuloj.

Ĉeĥaj esperantistoj vere strebis organizi neforgeseblan kongreson kaj prezenti kiel eble plej bone la ĉeĥan landon. Ĉe la fino ili estis regalitaj per ladskatolaj bieroj kun simbolo de la kongreso.

La venontjara UK okazos en Aŭstrio en la urbo Graz, de la 1-a ĝis la 8-a de Aŭgusto. Partoprenu ĝin!

Liba GABALDA

Öresundbron – Øresundsbron – 25-jara

En Danio ni diras: ”Ŝatata infano havas plurajn nomojn”. Tion oni povas diri pri la firma konekto inter Danio kaj Germanio – danoj diras *Femern*, germanoj *Fehmarn*. Same pri la firma konekto (ponto-tunelo) inter Danio kaj Svedio – la svedoj diras *Öresundbron*, danoj *Øresundsbron*. Temas ĉio pri lingvo!

Sed – ni kun la svedoj samopinias, ke estas kialo por festi, ĉar en 2025 la konekto 25-jariĝas – pli precize la 1an de Julio. En la jaro 2000 la du monarkoj Carl Gustaf de Svedio kaj Margrethe de Danio (cetere ili estas kuzoj) kune inaŭguris la imponan konstruverkon. Sur la sveda flanko estis popola festo ĉe *Limhamn*, kaj sur la dana flanko ĉe *Kastrup* – la du lokoj, kie la konekto ”surteriĝas”.

Øresundsbron konsistas el 8 km longa ponto, 4 km longa tunelo kaj 4 km longa vojo sur artefarita insulo. Entute la konekto longas 15,9 km.

Estas ligo por laborlokoj, travivaĵoj, komerca vivo, studoj kaj kulturo. Ĝi estas parto de ĉiutago por miloj da homoj en la regiono.

Estas longa historio … kiel preskaŭ ĉiuj grandaj projektoj. Malantaŭ la konstruo estas jarcentlonga vico da vizioj kaj planoj. Jam fine de la 19-a jarcento ekestis la unuaj ideoj pri firma konekto inter Svedio kaj Danio. Tiam finfine ni ĉesis militi unu kontraŭ la alia – nun ni batalas nur sur la futbal-kampo (tio estas ankaŭ tre serioza afero!) kaj bone kunlaboras. Sed nur en la 1950-aj jaroj oni komencis paroli pri realaj planoj. En 1991 la du landoj subskribis la ”pont-interkonsenton” pri firma konekto trans *Øresund*. Kompare al jarcentlonga diskuto oni povas diri, ke dekjara konstruperiodo estas mallonga.

Kompreneble estas komplika posedantkonstruo, sed la ĉefa reganto de la tuto, *Øresundsbro Konsortiet*, havas oficialan, formalan taskon:

La tasko de Øresundsbro Konsortiet estas sekurigi long-perspektivan kaj komerce sanan entreprenon. Fokuso estas ekspluatado kaj bontenado de la fizika konekto kaj cetere surmerkatigo, klientservo kaj financado. Per enspezoj de la komerca parto de la entrepreno ni devas repagi la pruntojn, per kiuj ni konstruis la ponton.

La konekto havas fervojon kaj aŭtoŝoseon.

Krom la fakto, ke la konekto efikigas kaj rapidigas la vojaĝon inter la du landoj, la konekto influis kaj influas la celkonscian evoluon de la limregiono. La konekto donas al la enloĝantoj en ambaŭ landoj liberecon agi kaj moviĝi – kaj ankaŭ por la turistoj ĝi donas multajn eblojn.

Fakte la revo kaj vizio pri *Øresund*-regiono pli-malpli sukcesis.

En la jaro 2024 estis 4.216.345 enloĝantoj en la regiono.

Laŭ statistiko de 2024 21.585 homoj navedis trans *Øresund* (kresko de 9% kompare al la statistiko de 2023). 95% de la navedantoj laboras en orienta Danio.

Estas tie 13 universitatoj, universitat-filioj kaj svedaj altlernejoj en la *Øresund*-regiono. Kune ili havas 148.000 studentojn. Se oni aldonas la danajn altlernejojn kaj komercajn edukejojn, en la *Øresund*-regiono estas 194.600 studentoj.

La kunlaboro okazas en multaj manieroj en la du landoj kaj la konekto povas fiere celebri sian 25-an naskiĝtagon. Post kiam en la jaro 2029 (laŭ la nunaj planoj) la *Femern*-konekto estos malfermita, *Øresundsbron* havos eĉ pli gravan rolon kiel parto de la Skandinavio-Eŭropo-trafiko. Pro tio oni momente analizas ”la trafikbildon 2050” kaj diskutas pri plia firma konekto inter Svedio kaj Danio … sed ĝis nun nur analizoj, kaj ni vidu pri la evoluo dum la venontaj jaroj.

JUN, Fonto: *NJT*, Majo 2025

Grandrapidaj trajnoj en Usono

La kompanio *Amtrak* ekfunkciigas de la 28-a de Aŭgusto 2025 novan generacion de grandrapidaj trajnoj *Acela*. La trajnkompleto nomita *NextGen Acela* veturos sur fervojlinio inter *Boston, New York* kaj *Washington D.C.*

La ektrafikon anoncis la entrepreno en siaj retpaĝoj. Ĝi komencos per kvin trajnkompletoj kaj ĝis la jaro 2027 *Amtrak* transprenos entute 28 trajnojn.

Novaj trajnkompletoj proponas je 27 % pli grandan kapaciton (378 sidlokoj) ol ĝisnunaj trajnoj kaj frapante pli komfortan vojaĝadon. La maksimuma rapido estos 160 mejloj po hore, t.e. 257,5 km/h. La ĝisnuna generacio de *Acela*-trajnoj veturas je 150 mejloj po hore kaj restos ankoraŭ en trafiko.

La novajn grandrapidajn trajnojn produktas *Alstom* en sia fabriko en *Hornell* en la ŝtato *New York*. La trajnkompletoj estas naŭvagonaj kun lokomotivoj fronte kaj malantaŭe. La mendon ricevis *Alstom* en la jaro 2016. La produktado kaj precipe la aprobo kaŭzis pli ol kvarjaran malfruon.

La novaj trajnoj estas parto de granda modernigo de *Amtrak*-veturiloj. Krome la nova generacio de *Acela*-trajnoj *Amtrak* mendis ankaŭ *Airo*-trajnojn de *Siemens* por rapido ĝis 200 km/h.

Ladislav KOVÁŘ, laŭ artikolo, *Zdopravy.cz*, 16.8.2025

Fervojlinio Tanzanio - Burundio

Komenciĝis konstruado de la fervojlinio Tanzanio – Burundio kun celo plifortigi amikecon, kunlaboron kaj solidarecon.

AFRIKO: Konstruado de la fervojlinio el *Uvinza* en Tanzanio al *Musongati* en Burundio estis oficiale komencata la 16-an de Aŭgusto

2025 per festa ceremonio en *Rubara* en provinco *Burundi Burunga*, kiun partoprenis prezidento de Burundio Évariste Ndayishimiye kaj ĉef-ministro de Tanzanio Kassim Majaliwa.

La kontrakto kun valoro de 2,15 miliardoj *USD* por konstruado de 240 km elektrizita linio kun normala ŝpuro estis subskribata en Januaro inter ambaŭ registaroj, *China Railway Engineering Group* kaj *China Railway Engineering Design & Consulting Group*. Oni supozas, ke laboroj daŭros ses jarojn. Financadon donas Afrika banko por disvolviĝo pere de prefera prunto.

Ekonomia integriĝo

Oni atendas, ke la linio plifortigos ekonomian integradon kaj merkaton en la regiono per tio, ke ĝi grave malaltigos kostojn por transportado de varoj kaj personoj inter ambaŭ landoj. Ĝi priservos tri staciojn en enlanda Burundio kaj kvin en Tanzanio. Majaliwa diris, ke vojaĝantoj el Burundio povos atingi *Dar-es-Salaam* dum unu tago kaj tempodaŭro por vartransporto malgrandiĝos de 96 horoj al 20 horoj.

Oni atendas, ke la vartransporto inkluzivos mineralkrudaĵojn kiel ekz. nikelon, platenon, paladion, kupron, oron kaj feron el Burundio por eksporto tra haveno en Hinda oceano kun sumo ĝis 3 milionoj da tunoj po jare.

La tanzania trafikministro Makame Mbarawa diris, ke kostoj por transporto de unu 20-futa kontenero malaltiĝos el 3 800 USD al 2 000 USD.

Feliĉa tago

La prezidento Ndayishimiye menciis, ke partopreno de altrangaj reprezentantoj de ambaŭ landoj je la malferma ceremonio respegulas signifon de la projekto por plifortigo de amikeco, kunlaboro kaj solidareco.

„La hodiaŭa tago estas por ni feliĉa tago“, konfirmis la prezidento. „Dumtempe ni havis multajn diskutojn. En la jaro 1921 tiun ĉi projekton komencis belgoj kaj poste venis germanoj, sed la projekto ne sukcesis. Hodiaŭ ni en Tanzanio kaj Burundio sukcesis“. Rigardante estonton li diris: „Ni volas, ke la fervojlinio atingu *Kinda* oriente en Demokratia respubliko Kongo kaj poste ni volas, ke reloj atingu okcidentan Afrikon, surborde de la Atlantika oceano, ĉar ni kredas, ke tiu linio rapidigos disvolviĝon.“

Ladislav KOVÁŘ, laŭ *Railway Gazette International*, 19.8.2025

Novaĵoj el *Railtech.com*

Germanio kaj Unuiĝinta Reĝlando subskribis novan fervojkontrakton, sed kion ĝi signifas por la translima kunligo?

Germanio kaj Unuiĝinta Reĝlando subskribis komunan deklaron por esplori rektan fervojan servon tra Kanal-tunelo – la paŝo antaŭen el politika devontigo farita en julia *Kensington* – kontrakto. La transportministroj deklaras, ke ili estas nun decidiĝintaj krei fervojkonekton Londono – Berlino, sed „malgrandaj literoj“ malkovras tre antaŭgardeman planon.

La kompanio Alstom instalos *ERTMS*-sistemon sur la unua fervojlinio en Rumanio.

Alstom gajnis kun la kompanio *Arcada* gravan mendon por modernigo de fervojlinio Bukareŝto – *Giurgiu*, la grava fervojlinio en Rumanio. La kontrakto kun valoro de 450 milionoj da eŭroj enhavas elektrizadon kaj konstruon de *ERTMS*-sistemo sur la strategia koridoro kunliganta la rumanan ĉefurbon kun Bulgario.

Floto de *Frecciarossa 1000* de nova generacio trapasas aprobon.

La plej nova produkto de grandrapidaj trajnoj *Frecciarossa 1000* de kompanio *Trenitalia* nun trairas aproban fazon. La dua generacio de itala trajno promesas pli medikonforman dezajnon, novajn internaĵojn kaj pli vastan eŭropan aplikon, subtenatan per investo de *FS Group* valora 1,3 miliardojn da eŭroj, kiu enhavas entute 46 trajnojn.

Ladislav KOVÁŘ, foto kaj artikolo Railtech.com, 18.8.2025

Historia fervojlinio *NYMR*

North Yorkshire Moors Railway (NYMR) estas unu el la plej uzataj historiaj fervojlinioj kun normala ŝpuro en Britio kaj ankaŭ la plej ŝatata historia fervojlinio en Unuiĝinta Reĝlando laŭ gazetara informo el la jaro 2020. La linio longas 29 km (kun plilongigo trans *Network Rails* al haveno *Whitby* ĝi longas 39 km) kaj kondukas el *Pickering* al *Grosmont* en graflando *North Yorkshire*. La linio trapasas nacian parkon *North York Moors*.

La fervojon posedas karitata organizo *North York Moors Historical Railway Trust Ltd.* kun 100 dungitoj (plentempa dungiteco), 50 sezonaj dungitoj kaj pli ol 550 volontuloj.

Kutime la trajnoj veturadas tage komence de Aprilo ĝis fino de Oktobro, en vintra sezono dum semajnfinoj kaj festoj. Oni plej ofte uzas vaporlokomotivojn, foje dizelajn lokomotivojn. En la plej densa horaro forveturas trajnoj el ĉiu stacio ĉiun horon. Krome normala trafiko estas por vojaĝantoj disponebla dum vesperaj horoj kaj semajnfinoj manĝoservado. Popularaj estas vaportrakciaj veturoj al ĉemara urbo *Whitby*.

Historio

NYMR-fervojlinio estis unuan fojon malfermita en la jaro 1836 kiel *Whitby and Pickering Railway*. La linio estis planata en la jaro 1831 de George Stephenson kiel rimedo por malfermo de merkatvojoj al landinterno el tiam grava marhaveno *Whitby*. La origina fervojo estis proponata kaj konstruata por uzo de ĉevalveturiloj. La konstruadon faris maristoj kaj ĝin kunordigis famaj inĝenieroj. Ilia grava sukceso estis 110 m longa tunelo en roko proksime de *Grosmont*.

En la jaro 1845 estis la fervojo adaptata por uzado de vaporlokomotivoj. Tiam estis ankaŭ konstruataj stacidomoj kaj aliaj ĉeliniaj konstruaĵoj, kiuj tie staras ĝis nun.

Dum la dua duono de la 19-a jarcento kaj unua duono de la 20-a posedantoj kelkfoje ŝanĝiĝis. Lasta posedanto– *British Railway*, nuligis pasaĝertransportadon en la jaro 1965 kaj vartransporton en sekva jaro 1966.

En la jaro 1972 transprenis la fervojon nuntempa posedanto kaj ricevis necesan „Regularon por malpezaj fervojoj“, kiu ebligis koncesion por uzado de la fervojo. La fervojo estis denove malfermata por trafiko en la jaro 1973.

Dum kovidmalsano en la jaroj 2020 kaj 2021 estis trafiko nuligita dum kelkaj monatoj. Minacis entuta trafiknuligo – pro tio estas publikigata kriza alvoko, kiu alportis 400 000 pundojn kaj el Fonduso por renovigo de

kulturo venis 295 000 pundoj. La trafiko estis renovigata. La 12-an de Junio 2023 venis reĝo Karolo la 3-a al stacio *Pickering* per brita reĝtrajno tirata per lokomotivo *Flying Scotsman* okaze de 100-jara datreveno de la lokomotivo kaj 50-a datreveno de tempo, de kiam la nuntempa fervojlinio estas priservata de volontuloj.

Ladislav KOVÁŘ, laŭ „*North Yorkshire Moors Railway*", https//en.wikipedia.org

E-renkontiĝo en groto

Kutima somera renkontiĝo de esperantistoj-fervojistoj kaj gastoj el larĝa ĉirkaŭaĵo okazis nunjare ne "super abismo" sed subtere en la ĉeĥa nacia kultura memoraĵo - groto "*Zbrašov* – aragonita groto" en banloko *Teplice nad Bečvou* la 5-an de Aŭgusto. La aranĝon organizis denove Ivan Potiška kaj ĝia celo estis fakte la groto en *Zbrašov – Teplice nad Bečvou*. La kaverno estas ĉefe interesa pro tio, ke ĝia dekoracio estiĝis alimaniere ol en aliaj kavernoj en Ĉeĥio. La motivo estas, ke stalagmitoj, ornamaĵoj, kristalkurtenoj ktp. kreitaj de kalcia karbonato ekestis el minerala akvo kun alta enhavo de karbida dioksido per kiu estis en pasinteco la kaverno plenigita. Mondunikaj estas t.n. flos-stalagmitoj (antaŭe nomataj gejseraj stalagmitoj).



Je la fino de la grotopromeno ni povis ankaŭ vidi skulptaĵojn de moderna arto. Post trarigardo de la groto (la vojtrotuaro por vizitantoj longas 340 metroj el entutaj 1400 metroj de ĝis nun malkovrita areo de la groto) kaj tagmanĝo en proksima banloka restoracio ni renkontiĝis kun "neturismaj" partoprenantoj en kiosko, kie ni restis en babilado kaj

rememorado pri la ĵus finiĝinta UK en Brno. Por iomete cerbumadi, ni plenumis teston preparitan de Ladislav Hakl, kiu bedaŭrinde ne povis partopreni.

La renkontiĝo finiĝis posttagmeze kun bona impreso pri agrable pasigita tempo kun geamikoj.

Ladislav KOVÁŘ

Amuza anguleto



Ordigu la pecetojn tiel, ke vi ricevos proverbon!

Preparis **Ivan POTIŠKA**, solvo de enigmo el n-ro IF 2025.4:

KIU DEMANDAS-TIU NE ERARAS.